

BULGARA

6 • 1981

ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



LA BALOTOJ — MANIFESTIGO DE POPOLA DEMOKRATIO

La 7a de junio, k. j., estis impona kaj ĝojiga tutpopola festo en Bulgario. Okazis balotoj por la plej supera ŝtatorgano de la popola regpotenco — la Parlamento, elektitaj estis popolaj reprezentantoj, komunumestroj kaj popolaj konsilantaroj en la komunumoj, ĵuĝistoj kaj asessoroj.

La elekto de tiuj ĉi organoj de la Popola Registaro ĉiam estis grava politika evento, ĉar la balotoj de superaj kaj lokaj organoj de la Ŝtata Registaro estas esprimo de vera popola demokratio, de altnivela sociala kaj politika aktiveco de la popolo, de ties respondeca civitana pozicio. Tiuj ĉi balotoj estas reala pruvo de la konciza, tamen riĉenhava teksto de l'Konstitucio de Popola Respubliko Bulgario, kiu deklaras, ke la regpotenco de la Respubliko devenas de la popolo kaj apartenas al la popolo.

La balotoj estas vera realigo de la kompreno, ke la Socialismo kaj la Demokratio en nia lando estas nedisigeblaj.

En etoso de grandioza politika kaj labora elano estis elektitaj 400 popolaj reprezentantoj. Ili estas homoj sange ligitaj kun la popolo. Multaj el ili aktive partoprenis la popolajn liberlgajn batalojn, partizananajn taĉmentojn, estis en la koncentrejoj aŭ estis politikaj malliberuloj.

* Bulgara Popola Agrara Unuiĝo

Centoj el ili laboras en la produktado: elstaraj konstruistoj, metallaboristoj, tekslaborkonstruistoj, agrikulturistoj — homoj, kiuj ne indulgas fortojn kaj energion en sia sindona laboro por la prospero de la popolo.

Inter la elektitoj figuras la nomoj de eminentaj kulturagantoj, verkistoj, poetoj, nomoj de meritaj ekonomiaj kaj ŝtataj gvidantoj.

El inter tiuj ĉi fidelaj geiloj de la popolo, aktivuloj de BKP, BPAU* kaj senpartiaj en la listo de la elektitoj kaploke estas la ĝenerala sekretario de BKP Todor Jivkov, daŭriganto de la fero de Dimitar Blagoev kaj Georgi Dimitrov, elstara aktivulo de la internacia laborista kaj komunista movado, la homo, kiu evoluis ekde laboristo ĝis unua partia kaj ŝtata gvidanto.

En la balotoj la bulgara popolo montris sian grandiozan konfidon, estimon kaj dankemon al la reprezentantoj de la tutpopola Patrolanda Fronto.

La bulgaraj esperantistoj, kiuj voĉdonis por la popolaj reprezentantoj, sendas siajn elektitojn en la superajn kaj lokajn organojn de la Ŝtata Registaro kun firma kredo pri ties sindonemo por la akiro de novaj, pli grandaj sukcesoj de la landa ekonomio, por perfektigo de nia politika sistemo kaj por la triumfo de la socialisma demokratio.

ENHAVO

* * * Estu Bulgario!	1,2
K. Ivanov. Flama heroldo de Esperanto	3
* * * XIV Konsultigo de SLEO-j	4
Doc. G. Dimov. „Mister“ rememoras	7
Akad. D. Angelov. Formigo de la bulgara nacieco	8
* * * Fratan saluton, vjetnamaj amikoj!	9
D-ro L. Molnar. Medicinistoj kaj Esperanto	10
B. Ragnarsson. Por efika kultura agado	11
B. Golden. La plej malfacila vortparo en Esperanto: „pesi/pezi“	12/13
* * * Letero de Zamenhof	13
N. Janev. Gabrovo ridas	14/15
Fr. Kral. Kiam la vicaj marŝis	15
R. Degrelle. Pli ol la tuta or' de l'mondo!	16
P. Miluŝev. Brila estonto de la sporta akrobatiko	111
Sur la kovrilpaĝo: Ĉe la haveno de Nesebar.	

Redakta komitato:

Dončo HITROV (ĉefredaktoro), Marin BAČEV, Vasil BOROVIANSKI, Dimitar DENČEV, Evgeni GEORGIEV (sekretario), Dimitar HAČIEV, Krastju KARUCIN, Haim LEVI (vicĉefredaktoro), Flori NIKOLOV.

Administranto: Metodi GAREV

Korektis: Evgeni GEORGIEV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919 j. Eldonkvanto 6 100.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97,
1303 Sofio, Bulgario

tel. 32-40-68, 31-00-29

P. K. 66
1000 Sofio



ESTU BULGARIO!...

Parolo de kamaradino Ljudmila Jivkova, Prezidanto de la Komitato pri Kulturo, en la unua el la 13 jubileaj tagoj — „Tero, nomata Bulgario“

Jarcentoj, epokoj, kulturo, civilizacioj kaj popoloj, venkintoj kaj venkitoj, kreantoj kaj inventantoj, herooj kaj martiroj — la homaro — malrapide kaj pene surprinadis kaj supreniras la krutan vojon al la progreso. Sur la infinita spiralo de la evolucio monolite estas ĉizitaj la pintoj de la popola heroaĵo; forte brilas la steloj de kreantoj kaj portantoj de la eterna fajro; lumas la aŭdaco de tiuj, kiuj transformas la sinoferon al venko, kaj la amon — al brilanta kristalo, reflektanta la gojon pri komuna bono.

La memoro de la historio konservis la solenajn festojn de la homa spirito, stampitajn sur la sorto de la Planedo kiel fajrajn sanktaĵojn kaj himnojn de la venko; ili lumigas kiel flamanta torĉo la krutan vojon de la homaro sur la eterna ŝtuparo de la evolucio.

Dum la eterna movo de epokoj kaj kulturoj la legantoj konservis la komencon de la bulgara prototipo, sintezitan en figuro de fluganta rajdanto elananta al novaj mondoj, portanta en si la monolitan kaj nehaltigeblan strebon de aspiri al la nekonataĵo, konkerante kaj firmigante la novon. Tiu solena simbolo — sintezo de eterna evoluo — unuigas en unu tuteco la eternan historian kaj kulturan spertojn de Bulgario.

Forpasis 1300 jaroj post tiu ĵoro, historia jaro, la unua, en kiu tie ĉi sur la Balkana Duoninsulo, sur la malkvieta vojkruciĝo de popoloj kaj civilizacioj estis fondita la bulgara ŝtato.

Estis 681.

Kaj hodiaŭ estas 1981.

En la nuna jaro ni ĉiuj, posteuloj de Asparuh kaj Simeon, de Konstantin—Kirilo kaj Paisij Hilendarski, de Blagoev kaj Dimi-

trov — la kreantoj kaj konstruantoj de nuntempa socialisma Bulgario — ni celebras la 13-jarcentan jubileon de la bulgara ŝtato, de nia antikva kaj juna socialisma patrolando.

Per la saĝeco de sia miljara aĝo, per la sperto de la generacioj, transportantaj ĉiun jarcentoj la triumfon de spirito, la forton de kreado kaj konstruo, hodiaŭ socialisma Bulgario manifestas rekonon pri ĉio progresema, demokratia kaj humaneca en la evoluo de sia kaj de fremdaj popoloj. Ĝi firmigas la bonan najbarecon kaj la pacon, la reciprokecan estimon kaj komprenigon — tiujn antikvajn verojn, kiuj ĉiam servis al la progreso kaj firmigadis la rajton de ĉiu popolo kaj homo sin dediĉi al la komuna bono.

La unueco inter Estinteco kaj Estonteco — tiu ĉi klara kaj lakona formulo estas sintezo de la pinto, kiun atingis nuntempa socialisma Bulgario, pinto grimpita de konataj kaj nekonataj herooj, pereintaj en la nomo de la libereco, de la kreado, renaskiĝinta el la cindro de incendioj; en la nomo de la aŭdaco, transportata fare de forto de eterne fajra aspiri; en la nomo de kreado, konkeranta kaj konfirmanta la belecon en la vivo; de la heroaĵo, transdonata fare de generacioj da patroj, da filoj kaj filinoj kiel flamanta torĉo de la venko.

„Mi venas el la Estinteco, mi iras al la Estonteco“ — testamento, venanta el la profundoj de la antikveco, naskita sur tiu ĉi Tero kiel nevidebla fajra disko, puŝanta la evoluon de kulturoj kaj popoloj.

Estas tiel, ĉar nuntempa socialisma Bulgario supreniras la sentiman altan supron de la komunisma Estonteco.

En la analoj de la historio la jaro 1981 restos kiel jaro, en kiu lokon havis la XII

Kongreso de la Bulgara Komunista Partio, jaro markanta 25-jaran jubileon de la aprila spirito, 90-jaran jubileon de la Partio de la Bulgara Komunistoj, jaro nomata fruktodona, ĉar ĝi unuigas en monolitan unuecon la strebojn, la laboron, la heroecon, la kreadon kaj la maturecon de popolo kaj partio, de ŝtato kaj homoj.

Sur ĉevalo, post transiro de Danubo, Asparuh diris: „Tie ĉi estu Bulgario!“ por ke hodiaŭ ni, liaj posteuloj kaj heredantoj povu celebri la unuan el la 13 simbolaj tagoj — „Tero. nomata Bulgario“ dediĉe al la 1300-jara jubileo.

Solena himno kaj apoteozo de ĉio batalema kaj glora, sankta kaj flamanta, de ĉio sunoplena kaj ĝoja.

Ni volas, ke tia estu la hodiaŭa tago de Bulgario.

Tia ĝin fortikigas la laboruloj, traflugante tra la fajro de la suferoj!

Tia ĝin firmigas la patrinoj, portantoj de amo!

Tia ĝin prikantus la artkreatoj, portantoj de la flamanta spirito!..

Tia ĝin firmigas la instruantoj, tia estos ĝi — la morgaŭa tago de Bulgario.

Antaŭ 25 jaroj naskiĝis la aprila spirito. Dum 25 jaroj, en bataloj kaj obstakloj, en laboro kaj kreado, la partio kaj la popolo revivigadis la spiriton kaj la forton de tiu ĉi popolo, spertinta falojn kaj pogromojn, majestecon kaj gloron, heroecon kaj belecon.

Hodiaŭ denove estas Printempo. Per miloj da tonoj sonas la printempo, per miloj da kolornuancoj ree sin vestas la naturo. Miloj da novaj floroj — eterna simbolo de renaskiĝanta spirito — ĝermas en la animoj de la bulgara popolo kaj infanoj.

La printempo de Bulgario estas printempo

de nova, renaskiĝanta spirito, de eterna strebo, kernanta en la homoj, kiuj impetas al beleco, libereco, kreado. Kaj ni, bulgaroj, ni fieras, ĉar ni povas vivi laŭ la leĝoj de beleco; ĉar la simbolo de la bulgara printempo, pentrita fare de nia eminenta pentristo Vladimir Dimitrov — La Majstro per figuro de virino kun floroj kaj fruktoj enmane, estas tiu eterna simbolo sur la Tero, kiu per laboro kaj amo devas esti rekrea de la homo.

„Unueco, Kreado, Beleco“ — testamento, naskita sur tiu ĉi Tero, nova sintezo de la sintezoj, formulo kun fajra alvoko, kiu enhavas la neceson firmigi la fratecon kaj la kunlaboron sur la tero; firmigi la rajton de la homo esti libera kreanto de materiaj kaj spiritaĵoj; firmigi la pacan kunekzistadon — tiun bi-vitale necesan principon, kiun testamentis al la homaro la granda Lenin.

Per monolita unueco de frateco kaj kunlaboro, kiam infanoj kaj homoj el ĉiuj anguloj de la Planedo etendos al si la manojn en la nomo de la amo — tiam la standardo de paco kaj kulturo, sur kiu staras la surskribo „Unueco, Kreado, Beleco“ flirtos super la Planedo por proklami la rajton de ĉiu lando kaj homo vivi konforme al la leĝoj de la beleco, ĉiam pretaj por laboro kaj amo, digne kaj respondece konstrui la komunan estontecon sur la Planedo.

Tia ni vin firmigas, Tago unua de Bulgario, tago de Tero, nomata Bulgario, ĉar vi malfermis la koron de via metropolo Sofio al la rideto, la ĝojo kaj la kreado de ĉiuj infanoj sur la Planedo, ĉar vi aŭdacis alvoki la homaron al strebo pri ĉarma mondo de perfekteco kaj beleco; vi aŭdacis konfirmi la rajton de la homo esti kreanto.

ALTAJ ŜTATAJ DISTINGOJ

Okaze de 24a de majo — Tago de la bulgara kulturo, slava skribo kaj bulgara gazetaro la Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario distingis per altaj titoloj la eminentajn bulgarajn esperantistojn prof. d-ro Stojan Ĝuĝev — „Merita aganto de la arto“, Nano Kjuĉukov — „Merita aganto de la kulturo“ kaj Veselin Damjanov — „Merita artisto“.

PROF. D-RO STOJAN ĜUĜEV estas elstara muzikpedagogo, aŭtoro de multaj altnivelaĵoj verkoj pri la historio kaj teorio de la muziko kaj teorio de la muziko kaj la horegrafio. Prof. Ĝuĝev ludis gravan rolon por la disvolvigo de la bulgara E-movado kiel ĝia aktivulo, prezidanto de BEA, ĉefredaktoro de la asocia organo. Prof. Ĝuĝev estas vicprezidanto de la Akademio de E-o.

NANO KJUĈUKOV — aktiva socia kaj kultura aganto. Eminentaj bulgara esperantisto kaj regula kunlaboranto de la E-gazetaro. Li multe kontribuis por la disvastigo de E-o, publikigante artikolojn en la nacia gazetaro. Nano Kjuĉukov estas vicprezidanto de BEA.

VESELIN DAMJANOV — kantartisto de la Ŝtata Muzikteatro „Stefan Makedonski (Sofio). Li estas plenumanto de multaj ĉefroloj en diversaj operetoj, laŭreato de bulgaraj kaj internaciaj konkursoj. Pli ol dek jarojn lia potenca baritono kaj granda artista talento manifestiĝas en la programoj de la Universalaĵ Kongresoj de Esperanto.

FLAMA HEROLDO DE ESPERANTO

(MEMORE AL IVAN SRESTANOV)



Parolas d-ro Boris Nedkov, prezidanto de Veterana Sekcio de BEA

Granda, tre granda estas la afero de Ivan Krestanov — unu el la plej elstaraj figuroj de la bulgara E-movado. Tiu afero eliris el la limoj de Bulgario, intime ligitis kun la E-movado en vico da landoj kaj kun la tutmonda E-movado.

Por celebri tiun aferon la 16an de majo en Srednogorie, kvartalo Pirdop — la naskiĝloko de Krestanov — kolektigis e-istoj el proksimaj lokoj kaj liaj samurbaroj. La celebri estis organizita de BEA kaj la Komunuma Komitato de la Bulgara Komunista Partio el Srednogorie dediĉe al la 90a naskiĝtago de Krestanov.

En la belega kulturdomo de la urbo okazis solena kunveno. En la prezidantaro sidis estimataj agantoj de la bulgara E-movado: prof. d-ro Stojan Guev — viceprezidanto de la Akademio de Esperanto, amiko kaj kunbatalanto de Krestanov, d-ro Vasil Nedkov — prezidanto de la Veterana sekcio de BEA, Kunco Valev — ĝenerala sekretario de BEA, Hristo Kanev — prezidanto de la Sofia Urba Estraro de BEA, Ljubomir Mihajlov — prezidanto de la Sofia DE de BEA, la unua sekretario de la Urba Komitato de Bulgara Komunista Partio — Kalcev, kaj aliaj reprezentantoj de la loka socio. La solenajn malfermis k-do Kalcev, kiu bonvenigis la gastojn kaj donis la parolon al K. Valev por fari prelegon pri la vivo kaj agado de Krestanov. Tiu agado daŭris 62 jarojn — de 1904, kiam Krestanov konatiĝis kun E-o, en u. Vraca, ĝis lia lasta tago en 1966, kiam li mortis 76-jara.

Krestanov estas fama unue pro sia aktiva agado en eksterlando por popularigo kaj defendo de Bulgario. Al lia plumo apartenas pli ol 200 artikoloj pri Bulgario, aperintaj en la okcidentaŭropa gazetaro, centoj da prelegoj samcele en Francio, Svislando, Germanio, Nederlando, skandinaviaj landoj, Islando k. a. En

1918 li aperigis sian libron „La bulgara lando kaj popolo“ — 200-paĝa, originale verkita en E-o, unu el la plej bonaj de tiu speco.

Aparte aktiva kaj fruktodona estas la agado de Krestanov por popularigo de la bulgara literaturo eksterlande. Al la monda E-publiko li prezentis en sia traduko pli ol kvardek bulgarajn verkistojn kun pli ol cent verkoj.

Krestanov estis eksterordinara aktiva propagandanto kaj disvastiganto de E-o en Bulgario. Ĉie, kie li laboris kiel instruisto de franca kaj germana lingvoj (Sofio, Botevgrad, Plovdiv, Karlovo, Asenovgrad, Sadovo k. a.) li organizis kaj gvidis plensukcese E-kursojn — pli ol cent. Tra tiuj kursoj trapasis miloj da bulgaraj civitanoj, precipe junuloj. Lerninte la lingvon de la internacia amikeco, ili edukigis en humanisma, progresema spirito. Aparte interesa fakto: en 1926 en Botevgrad inter la kursanoj de Krestanov fervore lernis E-on ankaŭ la malgranda lernanto Todor Jivkov el Pravec, la nuna ĝenerala sekretario de la Bulgara Komunista Partio kaj prezidanto de la Stata Soveto de Popola Respubliko Bulgario. Li ankaŭ membris kaj aktive laboris en la lerneja E-societo „Verda Radio“ en la tiea gimnazio.

Posedinte solidan filogian instruitecon, Ivan Krestanov verkis ankaŭ multajn broŝurojn, artikolojn kaj libretojn pri la problemoj de internacia lingvo kaj ties solvo per E-o. Jam en 1909, do tre juna, li iniciatis la eldonadon de „Bulgara Esperantista Biblioteko“, en kiu aperis pli ol deko da valoraj broŝuroj, uzitaj bonege en la propagando de E-o en nia lando. En 1922 aperis lernolibro de E-o de Krestanov, poste — duobla vortaro — Esperanto-bulgara kaj Bulgara-esperanta, kiu havis 3 eldonojn.

Pro siaj bonaj verkoj, brila stilo kiel publicisto kaj oratoro kaj pro sia elstara instrulaboro Ivan Krestanov frue fariĝis membro de la plej elstaraj internaciaj E-institucioj: jam en 1912 — membro de la Lingva Komitato kaj de 1947 ĝismorte — membro de la Akademio de E-o. Li estas la unua E-akademiano el Bulgario.

Arda patrioto kaj internaciisto, demokrato kaj humanisto, senlaca laboranto por paco, amikeco kaj aktiva kultura interŝanĝo inter la popoloj — tia estis Ivan Krestanov. Per sia tuta afero li restos por ĉiam en la panteono de la bulgara kaj internacia E-movadoj. Pri tiu afero ni rajte fieras. Nia altmoralo devo estas senĉese labori kaj batali por ĝia triumfo.

Post la tre interesa kaj faktoria raportoj de k-do K. Valev oni tralegis la decidon de la Komunuma Konsilantaro pri nomigo de unu el la centraj stratoj de Srednogorie al Ivan Krestanov. Sekvis akcepto de du salutelegramoj — al CK de BKP kaj al la Monda Packonsilio.

La solenaĵo finiĝis per riĉa belarta programo, kiun partoprenis infanaj grupoj el Spednogorie kaj Sofio, kaj la sofiaj artistoj-esperantistoj Maria Angelova (soprano), Dimitar Denčev (tenoro), Mišo Zdravev — recitanto.

La sekvan tagon en la sama kulturdomo okazis altnivela pedagogia konferenco, kiun partoprenis reprezentantoj el Sofio, la distriktoj de Sofio, Pernik, Blagoevgrad kaj Kjustendil. Modelan lecionon faris „la elstara lektoro“ Mihail Elenov el Sofio. La diskutado pri la organiza kaj metodika stato de ni instrulaboro estis tre fruktodona.

K. IVANOV

XIV-a KONSULTIĜO DE SLEO-j

De 16a ĝis 22a de aprilo 1981 en urbo Pĉerov (ĈSR) okazis XIV Konsultiĝo de la Socialismaj Landaj E-organizanoj (SLEO-j).

Partoprenis reprezentantoj de: Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, Asocio de E-istoj en SSR, Bulgara E-Asocio, Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de DDR, Ĉeĥa E-Asocio, Hungara E-Asocio, Pola E-Asocio, Vjetnama Pacgafenda E-Asocio.

La unuopaj delegacioj informigis pri la atingitaj rezultoj fare de la partoprenantaj SLEO-j, interŝanĝis

laborplanojn, spertojn kaj informojn el diversaj interŝanĝoj. Ili akceptis rekomendojn por ligi pli profundajn kaj multflankajn laborkontaktojn inter siaj asocioj kaj kun tiuj organizoj, kie ekzistas intereso pri Esperanto, kiel ekzemple ĉe la turismaj instancoj.

La Konsultiĝo aprobis rezoluciojn pri la internacia politika situacio kaj pri la solidareco kun Vjetnamio, Laoso kaj Kampuĉio.

La partoprenantoj esprimis siajn dankojn al la Ĉeĥa E-Asocio pro certigo de bonaj laborkondiĉoj.

REZOLUCIO

La reprezentantoj de la Esperanto-organizoj en la socialismaj landoj, kunvenintaj en la urbo Pĉerov, ĈSR, esprimas sian grandan zorgon pri la akriĝinta monda situacio, kiu ekestis pro kulpo de la plej agresemaj imperiismaj rondo en la okcidentaj ŝtatoj.

Kiel konsekvencaj agantoj por la paco kaj amikeco inter la popoloj, ni forte indignas kontraŭ la semantoj de malamo kaj provokantoj de interŝtataj konfliktoj.

Ni senrezerve subtenas ĉiujn sociajn fortojn, organizojn kaj movadojn, kiuj energie kontraŭstaras la fabrikadon de nukleaj kaj neŭtronaj armiloj, destinitaj por lukigo sur la teritorio de Okcidenta Eŭropo.

Ni plenforte subtenas la porpacajn iniciatojn de la socialismaj landoj — frunte kun Soveta Unio — kaj de aliaj landoj pri senkondiĉa intertrakto koncerne la forigon de ĉiuj nukleaj armiloj el Eŭropo, kiuj minacas ties ekziston.

Ni alvokas la esperantistaron de la tuta mondo unuigi kaj dediĉi sin ankoraŭ pli fervore al la plej urĝa kaj nobla afero: la forigo de la militdangero kaj la konservado de la vivo sur la tero!

La esperantistaro agu, por ke la internacia streĉiteco ne domagu al la monda Esperanto-movado.

II

La Konsultiĝo, substrekante, ke nur sub pacaj kondiĉoj la Esperanto-movado povas progresi, post la aŭskulto de raportoj, proponoj kaj diskutoj, opinias utile:

— ke la landaj asocioj direktu sian laboron por varbado de freŝaj fortoj kaj ties eduko kaj altiro al gvidorganiza agado;

— helpadu la junularajn sekciojn ĉe la organizado de laborbrigadoj, festivaloj, oratoraj konkursoj, internaciaj renkontoj;

— organizu semajnojn kaj ĉatagajn seminariojn kaj kursojn por pedagogoj kaj kadruoj de loka, departementa kaj landa signifo;

— plintensigu la aplikadon de Esperanto en neesperantistaj medioj kaj organizanoj, en turismo kulturo kaj arto;

— ellaboru proponojn pri kompilo de fakvortaroj kaj de terminaroj pri la socialisma socio;

— plibonigu la perspektivan planadon de siaj aktivecoj kaj pli frue interŝanĝu laborplanojn por tiel kunordigi sian laboron;

— iniciatu kaj pliaktivigu interlingvistikajn kaj esperantologiajn esplorojn kaj sociologiajn esplorojn pri la Esperanto-movado en socialismaj landoj laŭ la sperto de ĈEA.

Pĉerov, la 22-an de aprilo 1981

Reprezentantoj de SLEO-j de Bulgario, ĈSR, SSR, GDR, Hungario, Pollando, USSR, Vjetnamio.



La reprezentantoj de BEA Ĥristo Gorov kaj Nikola Aleksiev (de dekstre)

ORGANIZA VIVO

JURISTA ORKESTRO KONCERTIS ANTAŬ ESPERANTISTOJ EN SOFIO

En aprilo la E-sekcio „Justeco“ ĉe la Asocio de la juristoj en Bulgario kunlabore kun la Urba Estraro de BEA organizis solenan koncerton dediĉe al la 1300-jara jubileo de la fondigo de la bulgara ŝtato. La koncerto pasis sub la slogano „Per E-o por paco, internacia komprenigo kaj kulturo!“ La jurista simfonia orkestro sub la direkto de Asen Enev plenumis riĉan programon, kiu enhavis verkojn de Beethoven, Bize, Lehar, Sostakoviĉ, Vivaldi k. a. La artistino Belka Beleva recitis en E-o la versaĵon „Bulgario“ de Valeri Petrov, kaj la operkantistino Maria Angelova plenumis la bulgaran kanton „Devojĉe“ (Junulineto) de Dobri Hristov kaj la faman arion de Gilda el opero „Rigoletto“.

Paroladon pri la granda celebrata evento faris Genčo Genĉev, prezidanto de E-sekcio „Justeco“. Estis distingita Petăr Taŝkov per honora insigno pro ties 70-jariĝo.

En la nomo de la organizantoj G. Genĉev donacis florojn al la direktisto kaj la orkestranoj kaj esprimis dankon pro la bone aranĝita programo kaj brilaj plenumoj.



SOFIO. Sukcese finiĝis perfektiga E-kurso por juristoj. La gvidanto de la kurso Genčo Genĉev konstatis, ke la laboro pasis ĉe modela ordo kaj la kursanoj atingis bonajn rezultojn en ekspozicio de la Internacia Lingvo. Ili esprimis dankon al la kursgvidanto kaj deklaris, ke ili daŭrigos la lernadon de E-o.

G. G.

BELOVO. Je la 25a de marto okazis fonda kunveno de urba E-societo „Georgi Dimitrov“. La bazo por ties fondiĝo estis lokaj e-istoj, partoprenintaj en kursoj por komencantoj en v. Momina Klisura.

Gastoj de la kunveno estis M. Nenova, sekretario de Komunuma Komitato de la Patrolanda Fronto, Hr. Arĉev, prezidanto de Komunuma Komitato de la aktivaj batalantoj kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo, M. Strikova, sekretario de Elementa Partia Organizaĵo, ĉiuj el Belovo.

Oni elektis trimembran estraron de la novefondita E-societo. Prezidanto estiĝis Ivanka Pavlova.

Jordan NIKOLOV

BULGARA JOGURTO, JAPANOJ... KAJ ESPERANTO

... Kvankam iuj pritaksus mian eldiron iel stranga kaj eĉ paradoksa, mia opinio inter la mondfama bulgara „kiselo mljako“ (jogurto) kaj Esperanto estas io simila kaj intima... Ni venis en vian landon traŝtudi la kondiĉojn de produktado de tiu bongusta, altkvalita jogurto kaj laŭ la mendo de la japana firmao „MEIJI MILK PRODUCTS CO“ reklami ĝin ne nur en Japanio sed ankaŭ en la tuta mondo. Surloke ni eksciis pri la disvastigita E-movado en via lando kaj tute nanture ni kunligis tiun specifan bulgaran produktadon kun la internacieco de Esperanto — tiel vaste uzata en Bulgario...“

Per tiuj vere ŝokantaj vortoj s-ro Norio Kawasaki gvidanto de grupo de japanaj ĵurnalistoj kaj reklamagantoj de la plej granda en Japanio reklamagentejo DENTSU INCORPORATED — sin turnis al la partoprenantoj en la renkontiĝo, kiu okazis la 11an de majo k.j. en konferencejo de la Unuiĝo de Bulgaraj Ĵurnalistoj laŭ peto de la japanaj gastoj.

La honora prezidanto de MEM Nikola Alek-siev konigis al la gastoj la ĉefajn direktojn de la bulgara E-agado (organiza ŝtato, eldonado de periodaĵoj kaj libroj, kulturkleriga landa kaj eksterlanda aktivadoj ktp.) Speciale estis emfazita la intereso de la bulgaraj e-istoj pri Japanio kaj ties interrilatoj kun japanaj e-istoj.

Siaflanke la gastoj esprimis siajn bonegajn impresojn pri Bulgario kaj plezure rakontis pri siaj renkontoj kaj interparoloj kun bulgaroj dum sia vojaĝo tra la lando.

Eksciinte tiom da impresantaj informoj pri E-o kaj pri ties disvastigo en nia lando, la gastoj deklaris, ke ili provus profiti E-on en sia reklama agado, sed ili sendube jam estas konvinkitaj simpatiantoj al Esperanto.

En agrabla amika etoso la gastoj el malproksima Japanio havis interesajn interparolojn kun la ĉeestantaj esperantistoj.

D. S. H.

AMASA JER'81 EN HUNGARIO

700 gejunuloj el tuta Hungario kaj gastoj el Aŭstrio, Bulgario, CSSR, GDR, Jugoslavio, Pollando kaj Sovetunio, reprezentantoj de internaciaj organizaĵoj (Monda Federacio de la Demokrata Junularo, Internacia Studenta Unio, TEJO) kaj lokaj instancoj partoprenis en la okazinta la 4—6 de aprilo Junulara E-Renkontiĝo en urbo Szombathely (Okcidenta Hungario).

Riĉa belarta programo, multaj fakkunsidoj, interesa ekskurso al la antikva mezepoka urbo Kőszeg, aŭdvida prezentado, lingva seminario estis la allogaj eroj de la renkontiĝo.

Ni gratulas la gastigantojn pro la bonege organizita JER'81 kaj bondeziras pli grandajn sukcesojn en JER'82, okazonta en urbo Nyiregyháza.

Anton ANTONOV



SUKCESOJN, E-KINOAMATOROJ!

La 16an de majo k. j. en la Sofia Urba Junulara Domo „Liljana Dimitrova“ okazis la restariga kunveno de la sekcio. Ĝin partoprenis esperantistaj kino, foto kaj magnetofon-amatoroj el Sofio, Loveĉ, Ruse, Pazargik, Burgas, Trojan kaj el aliaj urboj de la lando.

Pri la preskaŭ 20-jara agado de la sekcio raportis ties ĝisnuna prezidanto Donĉo Ĥitrov. Li emfazis la gravecon de tiu agado por la popularigo de la Internacia Lingvo kaj de la aranĝoj de BEA, samkiel la taskon de ilia dokumentado por la estontaj generacioj.

Post viglaj pridiskutoj akceptita estis la Statuto de la sekcio, kiu difinas ĝiajn ĉefajn celojn kaj taskojn — esti vigla kronologiisto de la plej gravaj E-aranĝoj enlande kaj eksterlande, aktive ilin propagandi per fotoj, filmoj kaj magnetofonaj sonbendoj.

Estas kreitaj tri apartaj fakoj: „Kino“, „Foto“, „Magnetofono“, kiujn gvidos fakuloj.



Partoprenantoj en la kunveno

Inĝeniero Genĉo Cokanov el Sofio — aktivo de BEA kaj kinoamatoro estis unuanime elektita prezidanto de la sekcio de kino-foto-magnetofon-amatoroj de BEA.

En tiu kunveno estis fondita ankaŭ Sofia urba E-kinoklubo „Verda Objektivo“, kies prezidanto estos k-do Donĉo Ĥitrov.

La akceptita plano pri la agado de BEKFAS (Bulgara Esperantista Kino-foto-magnetofono — Sekcio) ĝis la fino de la kuranta jaro antaŭvidas registradon de la plej gravaj aranĝoj de BEA.

Novaj membroj de BEKFAS estas bonvenaj!

E. GEORGIEV



KASTORA KLUBO

La klubo akiris sian nomon el sia naskiĝloko — la malgranda urbo Denton en Anglio. La ĉefa industrio de Denton estis la fabrikado de ĉapeloj, por kiuj en malnovaj tempoj oni ofte uzis la felon de kastoro, kaj tiu besto aperas sur la urba blazono kaj ankaŭ sur la blazono de la lernejo, en kiu la klubo „naskiĝis“.

La klubon dum multaj (16) jaroj gvidis same mirinda homo J. H. SULLIVAN, kiu en 1964 internaciigis ĝin. La unua „internacia“ membro estis la 10-jara ĉefa knabo Jarek Hlavka. Ĝis nun la nombro de la membroj estas pli ol 1000!

Estas kvar gradoj de aneco — Kastoretoj, Brunaj Kastoroj, Argentaj Kastoroj kaj Oraj Kastoroj. Aneco estas senpaga, sed aliganto devas lerni kaj parkere ripeti al sia instruisto jenajn promeson:

„Mi promesas diligente lerni Esperanton;
mi promesas ĉiam porti la verdan stelon;
mi promesas ĉiam konsideri alian homon kiel
fraton de kiu ajn raso, koloro aŭ kredo li estu“.

La klubo havas propran paĝon en la internacia lerneja E-revuo „Juna Amiko“, kie aperas leteroj de la Ĉefa Kastoro — J. H. Sullivan, kaj artikoloj de li kaj de diversgradaj kastoroj. La revuo estas eldonata en Hungario kaj ĝia adreso estas: H-1368 Budapeŝt 5, Pf 193, sed ĝi estas havebla ankaŭ ĉe diversaj landaj asocioj. La redaktoro de „Juna Amiko“ estas amiko de la klubo — jen lia adreso: Geza Kurucz, Hitel u. 10, fszt 16, H-6000 Kecskemet, Hungario.

La laboro de J. H. Sullivan estas ege admirinda kaj samtempe ege malfacila. Krom la Kastora klubo Sullivan ankaŭ gvidas t. n. „Geonklojn Esperantistajn“. Tio estas alia organizaĵo, kiun li gvidas por helpi la infanojn. Se vi trovas, ke korespondado kun samaĝaj geknaboj ne bone daŭras, ĉar vi kaj via leteramiko ambaŭ estas lernantoj, vi eble ekdeziros havi „onklon“ aŭ „onklinon“ en alia lando, kiu helpus teni interesa la korespondadon. Se tio interesas vin, skribu al la Kastora klubo: 3, Berwick Avenue, Urmston Manchester, Anglio, N 31 IPS



„MISTER“ REMEMORAS...

Dum sia tuta konscia vivo Vasil Karagjov estas ligita kun la maro, kun partia laboro kaj Esperanto...

Naskita en 1904, li partoprenas kiel infano la t. n. „virinajn ribelojn dum la Unua Mondmilito, kiam pro malsato kaj mizero edzinoj, patrinoj kaj fratinoj de la militantaj soldatoj atakadis kaj disrabis nutramagazenojn... Dum 1917–1918 li estas aktivo en komunistaj klerigrondoj. En 1921 kiel studanto en la Marnaviga Lernejo en Varna li esperantigas, kaj post du jaroj membris en la Bulgara Komunista Partio. Karagjov ligas sian marveturan kaj partian laboron kun la Internacia Lingvo.

Laŭ komiso de la redakcio de „BE“ docento Georgi Dimov (Varna) renkontiĝis kun sia samurbano Vasil Karagjov kaj petis rakonti al nia legantoj pri iuj gravaj epizodoj el sia vivo kaj speciale pri sia E-agado.

Mi estas esperantisto de post 1921. Tiam mi estis studanto en la Marnaviga Lernejo en Varna. Nia „instruisto“ de E-o estis nia samstudanto el Sevlievo. Tiatempe mi havigis al mi el Svislando ilustritan lernolibron „Esperanto per bildoj“. Tiu lernolibro helpis al ni lerni la Internacian Lingvon. Ni fondis E-societon „Verda Lumturo“. Ĝi estis kontraŭleĝa, ĉar ĉiaspecaj societoj estis malpermesitaj en la Lernejo. En nia societo membris pli ol 20 studentoj kaj ĉiuj estis ankaŭ membroj de la Komso-molo.* En tiu tempo la ejoj de la Marnaviga Lernejo trovigis en la kazerno de 8a Apudmara Infanteria Regimento. En ties korto estis grandega fojnotenejo, kie ni, la esperantistoj, renkontiĝis. Je la sama loko ni okazigis regule kunvenojn. Ni abonis E-revuon, eldonatan en Nov-Jorko, en kiu oni publikigis multajn korespondetojn el la tuta mondo. Mi sendis mian korespondanoncecon al tiu revuo. Rezulte mi ricevis pli ol 1200 leterojn kaj bildkartojn el multaj landoj.

Post malkaŝo de la partia organizaĵo en la Lernejo en 1925 mi estis arestita kaj kruele turmentita. Oni ekisgis min el la Marnaviga Ler-

nejo kaj sen juĝverdikto ĵetis min en malliberejon. Tie mi restis kelkajn monatojn kaj pro manko de konkretaj argumentoj pri partopreno en komunista konspira agado oni liberigis min.

Mi havis ardan deziron ricevi superan klercon — mi intencis studi en politeknika instituto kaj fariĝi inĝeniero. Mi volis forveturi al urbo Aleksandrio (Egiptio), kie loĝis mia onklo. La Brita Konsulejo postulis de mi 1000 egiptajn pundojn por garantio kaj mi eĉ ne povis pensi pri pago de simila grandega sumo!... En tiu tempo ĉe la haveno de Varna oni ensipigis brutaron por Palestino. Mi sukcesis dungigi kiel gardisto de brutaro en la ŝipo „Varna“, kiu estis eknavigonta al Palestino. Mi ricevis dokumentojn kaj permesilon por unu naviga kurso. De Hajfa nia ŝipo veturis al Aleksandrio. Tie mi elŝipiĝis sur la kajon kaj kontaktiĝis kun lokaj e-istoj, kiuj promesis helpi miajn klopodojn pri studado en la tiea politeknika instituto. Post kelkaj monatoj la brita polico arestis min kaj forpelis el Egiptio.

Post mia reveno al Bulgario en 1929 mi eklaboris kiel maŝinisto en komerca

ŝipo „Burgas“. Tie mi konatiĝis kun la sampartiano Gino Stojnov. Ni kune havis kontaktojn kun sovetiaj maristoj, kies ŝipoj navigis tra Nigra Maro. El ili ni eksciis la veron pri la lando de Sovetoj. Plej viglaj kaj intimaj estis niaj kontaktoj kun la maristoj el la sovetia ŝipo „Ciĉerin“, en kiu laboris la serĝento Stepan Uljanov. Li estis sovetia militagento kaj de tempo al tempo komisiis al ni taskojn informi lin pri dislokigo de militaj objektoj en la haveno de Varna. Tiamaniere ni estigis liaj aktivaj helpantoj. Dum la Dua Mondmilito miaj informoj pri lokigo de germanaj minaj baroj en la haveno de Varna helpis al sovetiaj submarŝipoj ataki kaj subakvigi du germanajn militŝipojn. Kiel agente de la sovetia militesplora servo mi laboris dum pluraj jaroj sub la kromnomo „Mister“.

De 1930 ĝis 1932 mi elmigris al Turkio pro persekuto flanke de la polico, ĉar mi estis unu el la organizantoj kaj gvidantoj de marista striko. En Turkio mi kontaktiĝis ree kun Stepan Uljanov, kiu dum tiu periodo estis gvidanto de la sovetia militagentaro en la Balkanaj lan-

doj. Ni daŭrigis nian kunlaboradon.

En januaro 1932 mi revenis Bulgarien. En Varna mi kaj mia kamarado Gino esplordis militobjektojn kaj regule komunikis informojn al sovetiaj militagentoj. „Mister“ funkciis kuraĝe kaj persiste!...

Tiutempe mi eniris la vivojn de Bulgara Laborista Esperantista Asocio kaj estis gvidanto de progresigaj kursoj de E-o. La kursejo troviĝis en strato „Panagjuriste“ kaj miaj kursanoj nomis min „profesoro“, ĉar mi ellernis la tutan E-vortaron de H. Băčvarov. Mi instruis E-on laŭ lernolibro kaj metodo de

la eminenta esperantisto Sergej Rubljov el Odeso (Sovetunio). Miajn kursojn partoprenis precipe laboristoj, sed estis ankaŭ studentoj. Mia kursano estis Venizelos Georgiev, kiun Gestapo mortpafis en Greklando. Profunde lernis E-on nia elstara pentristo Janko Marinov kaj multaj aliaj.

En 1932 mi aĉetis la velboaton „Radecki“, kiun mi nomis „Esperanto“. Per ĝi mi veturigadis turistojn en la ĉeborda marregiono de Varna. Foje mi veturigis ankaŭ mian konversacianton — docenton Dimov! Mi ne estas certa ĉu li rememoras, sed „Mister“ memoras!...

La saman jaron okazis grava malkaŝo de la komunista organizado en Varna. La polico denove arestis min kaj mi estis kondamnita je morto, sed poste la verdikto estis abolicita. Mi trafis malliberejon. En la prizono de Sliven mi renkontiĝis kun nia elstara aktivulo Nikola Aleksiev, kun kiu ni interparolis esperante...

Per la Internacia Lingvo mi eksciis multon, trovis fidelajn kaj sindonajn amikojn. Mi ĝisvivis la venkon de la socialisma revolucio en faŝisma malliberejo.

Konversaciis:

Doc. GEORGI DIMOV

Varna, 1981



Akademiano DIMITAR ANGELOV

FORMIĜO DE LA BULGARA NACIECO

La formiĝo de la bulgara nacieco estas longdaŭra procedo, kiu efektiviĝis pere de iompostioma unuiĝo de la tri ĉefaj etnaj partoj: tracoj, slavo kaj prabulgaroj. Kiel ĝenerale efektiviĝas ĉe similaj etnaj procedoj, tio okazis sur difinita teritorio, kie realiĝis longtempaj ekonomiaj, moralaj, politikaj kaj kulturaj ligoj inter la tie loĝantaj etnaj grupoj. En tiu ĉi okazo temas pri la geografiaj regionoj Mizio (la nuna Norda Bulgario), Trakio kaj Makedonio, kiuj konsistigis la bazan teritorian kernon de la bulgara ŝtato en la IX kaj X jarcentoj.

En la mezo de la VII jarcento la tuta Balkana Duoninsulo jam estis dense loĝata de slavaj gentoj. La bulgaraj slavo, prezentantaj homogenan etnan amason, sukcesis en relative mallonga tempo okupi dominantan pozicion rilate la lokan balkanan loĝantaron kaj estiĝi gvidanta forto. Rapide disvolviĝis la asimila procedo.

Novaj esencaj ŝanĝoj de politika kaj etna karaktero ekestis en la balkanaj regionoj kune kun la apero de la prabulgaroj, gvidataj de Asparuh. Li estis unu el la filoj de hano Kubrat, reganto de la genta unuiĝo de la prabulgaroj en Suda Rusio, konata kiel „antikva granda Bulgario“ kaj disfalinta en la mezo

de la VII jarcento pro atakoj de hazaroj*.

Unu el la fundamentaj taskoj, starantaj antaŭ la regantoj de la juna bulgara ŝtato estis rebato de atakoj de hazaroj, avaroj* kaj bizancanoj, plivastigante samtempe ĝiajn limojn pere de integrigo de aliaj gentoj en la bulgara grupo.

Tiu ĉi politiko komenciĝis ankoraŭ dum la regado de hano Tervel (700–718), konsekvence kaj sukcese efektiviĝis en la daŭro de pli ol 2 jarcentoj.

En la dua duono de la IX kaj en la komenco de X jarcento, dum la regado de knazo** Boris (852–889) kaj de lia filo reĝo Simeon (893–927) preskaŭ ĉiuj slavo de la bulgara grupo, loĝantaj en Mizio, Trakio kaj Makedonio, estis unuiĝitaj en naturan etnan kaj ŝtatan konglomeraĵon.

Paralele kun tio ĉi solviĝis iompostiome la unuiĝo de la du fundamentaj etnaj grupoj — slavo kaj prabulgaroj. En tiu okazo ĉefa faktoro de simila unuiĝo estis la politiko de la ŝtato, direktita al rebato de la malamikaj atakoj kaj la plifortigo de la ŝtato en politika kaj milita rilatoj. Kune kun la militmarŝoj, kune kun la konstruado de fortikaĵoj, pontoj, vojoj, limgardado — ĉio kontribuis al la interproksimiĝo de la du etnaj grupoj, al venko de ekzistantaj popolkutimaj, religiaj kaj lingvaj diferencoj inter ili.

Decida puŝo tiudirekte estis la enkonduko de la kristanismo kiel ŝtata religio. La kristanismo signifis akcepton de novaj juraj normoj, de nova vivmaniero, de nova moralo, de novaj formoj de konduto.

La etnogenetika procedo estis finita definitive post la enkonduko de la slava skribo kaj literaturo. Dank'al kreo de skoloj en Ohrid kaj en Preslav la slavalingvo, kiu ankoraŭ ĝis tiam estis atinginta disvastiĝon, definitive firmiĝis en la tuta lando.

La fino de la IX kaj la unua kvarono de la X jarcento notis la definitivajn stabiligojn de la bulgara nacieco kiel forte unuiĝinta etna komunaro. Ĝiaj trajtoj estis: komuna lingvo, specifaj materiala kaj spirita kulturoj kaj unueca nacia memkonscio. Laŭ la lingvo kaj laŭ la memkonscio la bulgara popolo formiĝis kiel popolo, konscia sian apartenon al la granda familio de la slavaj popoloj. De la prabulgaroj restis la nomo de la ŝtato — Bulgario, de ili devenis, konserviĝis kaj evoluis la bulgara nacieco.

* nomadaj triboj

** cara titolo de Boris

FRATAN SALUTON, VJETNAMAJ AMIKOJ!

Nia frata organizaĵo — Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA) festas gravan datrevenon de sia aktivaĵo — 25 jarojn depost sia fondiĝo. Historie tiu tempodaŭro estas minimuma. Sed niaj bravaj vjetnamaj amikoj sukcesis prezenti dum mallonga periodo al la monda esperantistaro brilan ekzemplon de por- kaj peresperanta laboro. Sufiĉas nur emfazi la gravecon de la eldonagado de VPEA dum la patrolanda milito de Vjetnamio kontraŭ la francaj kaj usonaj imperiistoj. En militaj cirkonstancoj eldoni kelkdek da E-libroj — tio estis grandioza atingo. Ja multaj alilandaj E-asocioj dum 70-jara ekzistado ne sukcesis fari ion similan.

Ni sendas korajn salutojn al la elprovitaj patriotoj kaj internaciistoj, senhezitaj batalantoj por internacia amikeco, malarmado, sekureco kaj paco en la tuta mondo.

Sofio, majo, 1981

Nikola ALEKSIEV,
honora prezidanto de MEM



ĤO ŜI MIN

KVAR MONATOJN JAM!

„Unu jaro en karcero:
Mil longjaroj ĉe ekstero“.
Tiu dir' de antaŭuloj
Estas ja ne vanparoloj.

De mizero kvar monatoj
Per la malhomecaj batoj
Pli ol dek longjaroj de homvivo
Rongis korpon mian sen motivo.

Ĉar:
Kvar monatojn en malsato,
Kvar monatojn kun maldormo.
Sen ŝanĝiĝ' al vestato,
Sen memlavo, ekster normo. . .

Sekve:
Unu dento min forlasis,
Blankis al mi multaj haroj.
Mi nigriĝis kaj malgrasis
Kun skabio kaj cikatroj. . .

Feliĉege:
Mi pacienciĝas — neŝancela
Eĉ tercolon ne paŝante kankra
Materie, vere, tre mizera,
Sed morale — firmececa.

KLASA SOLIDARECO

Komence de 1921, granda striko de profesiaj maristoj eksplodis en Brazilo. Iu ŝipo estis ĵus alveninta al Rio de Janeiro. Ĝia ŝipano ne sciis, ke kamaradoj estis luktantaj kontraŭ la mastraro. Iu nigra strikanto, José Leandro da Silva, volis surŝipiĝi por anonci la novaĵon al la maristoj. Sur la kajo José renkontis policanon, kiu malpermesis al li la trapason.

— Sed mi ja havas la rajton iri vidi miajn kamaradojn, — diris José al la reprezentanto de l'ordo.

— Neniom da eksplikoj! Foriru! — replikis tiu lasta.

José insistis.

Anstataŭ respondo la policano elingigis sian revolveron kaj ekpafis. Lertmove José evitis la pafon kaj, fulmrapide li kaptis sian kontraŭulon kaj ĵetis lin en la akvon.

Kvindeko da armitaj policanoj alkuris kaj sin ĵetis sur José-on. Tiu lasta sin defendis. Per sia marista tranĉilo li mortigis kelkajn kaj vundis plurajn el ili. Fine li estis venkita kaj falis duonemorta, ricevinta 18 kuglojn en la korpo.

Li havis tamen sufiĉe da forto por murmuri la Internacion, kiam oni transportis lin al la hospitalo. Oni kondukis lin poste al la tribunalo. Li estis kondamnita al 30-jaroj de punlaboro.

Tuj post kiam la juĝo estis konita, la revoluciaj laboristoj fondis Defendokomitaton. Unuflanke, ili konfidis la kazon de sia kamarado al pluraj advokatoj, aliflanke, ili organizis protestmitingon tra la lando. Agit-kampanjo favore al José estis vigle farata dum tri jaroj. La publika opinio tiel indignis, ke la aŭtoritatoj devis rekomenci la proceson.

La 8an de februaro José estis denove ĵugata. 15000 laboristoj ĉestis la debatojn, kiuj daŭris la tutan nokton. La mastraro ne volis ellasi sian viktimon, kaj necesis al la prokuroro de l'Republiko 5-hora tempo por legi sian longan akuzparoladon.

Kun elekventeco kamarado Paŭlo de Lacerda kaj liaj kolegoj venke refutis la argumentojn de la prokuroro.

La debatoj finiĝis je la 4a horo kaj duono matene.


Sekvis senkulpiga verdikto.

Ĝi estis akceptita per tondro da aplaŭdoj. Kaj José, nigra strikanto, lasis sin fali en la brakojn de siaj kamaradoj kaj defendantoj, la delegitoj de l'blankaj laboristoj.

Do, malgraŭ la diferenco de l'haŭtkoloroj, estas nur du rasoj en la universo: tiu de ekspluatantoj kaj tiu de ekspluatatoj. Kaj estas nur unu frateco: kiu estas vera, la proleta frateco.

Majo, 1924

ĤO ŜI MIN



MEDICINISTOJ KAJ ESPERANTO

D-RO LAJOS MOLNAR

sekretario de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo

Zamenhof, la nobla iniciatinto de la Internacia Lingvo — kvankam li mem estis okulkuracisto — komence apenaŭ okupiĝis pri uzado de Esperanto por celoj de la medicino.

La unua paŝo tiucele estis la fondiĝo de la Tutmonda Esperatista Kuracista Asocio (TEKA) dum la Universala Kongreso en la jaro 1908. La nova asocio eldonis ankaŭ la revuon „Kuracisto“, sed venis la Unua Mondmilito, kaj la asocio ĉesis funkcii.

En la jaro 1923 D-ro K. Mezei, hungara kuracisto, eldonis esperantlingvan medicinan ĵurnalon sub titolo „Internacia Medicina Revuo“.

Dum la 15a UK de Esperanto en Nurenbergo TEKA elektis hungardevenan prezidanton (D-ro E. Sós) kaj hungaran sekretario (D-ro K. Kalocsay). D-ro E. Sós, tiama prezidanto de la Loka Kuracista Komitato, preparis la okazintan en 1929 Vianan Konferencon de TEKA. Dum la 21a UK en Budapeŝto en

la sama jaro la fakkunveno de la medicinistoj gvidis D-ro K. Mezei.

La lasta numero de la Internacia Medicina Revuo antaŭ la Dua Mondmilito aperis en la jaro 1937. La milito denove ĉesis la agadon de la esperantistaj sanitaraj laboruloj ne nur en Hungario, sed ankaŭ en la tuta mondo.

Post la Dua Mondmilito la medicina Esperanto-movado rekomenciĝis en Japanio, en la jaro 1951. La japanaj kolegoj komencis eldoni la revuon „Medicina Revuo“ en la sama jaro. Tiu ĉi revuo en 1959 fariĝis oficiala organo de TEKA. En la jaro 1961 anstataŭ TEKA fondiĝis la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA), kaj ĝia oficiala organo fariĝis la „Medicina Revuo“, kiu aperis unuafoje en 1964. En la sama jaro, dum la 49a UK D-ro Hideo Shinda fariĝis prezidanto de UMEA. Dum la Universalaj Kongresoj en tiuj jaroj kunvenis ne pli ol 100 esperantistaj gekolegoj.

La 51a okazis denove en Budapeŝto (1966). La tiaman kunvenon de UMEA partoprenis 79 medicinistoj, inter ili ankaŭ kelkaj hungaroj.

Kiel mi jam menciis, somere de 1979 okazis en Hodmezővásárhely la 2a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco. La Konferenco partoprenis 150 kuracistoj, apotekistoj, flegistinoj kaj ankaŭ veterinaroj el 8 landoj de Eŭropo. Tin ĉi konferenco estis tre verŝajne la plej sukcesa en la tuta ĝisnuna historio de la medicina Esperanto-Movado. La scienca prelegserio de la Konferenco (kiun organizis la membraro de la Budapeŝta Fakgrupo) daŭris 2 tagojn. La partoprenantoj povis aŭskulti 35 sciencajn, popularsciencajn prelegojn.

Ni pensas, ke la medicino estas karakterize paca scienco. Aplikante Esperanton — por celoj de la medicino, ni mofeste, sed konscie luktas ankaŭ por la tutmonda paco

ESPERANTO KAJ MIA PROFESIO

Estas io simila inter Esperanto kaj medicino. Ambaŭ estas vere internaciaj, kun tuthoma signifo kaj ligitaj kun granda homa espero.

Oni traktas la pacientojn kiel homojn, kiuj bezonas kuracistan helpon. Oni devas kuraci ilin, etike rilati al ili, eĉ kiam ili estas malbondezirantoj kaj malamikoj.

Mi estas kuracisto — psikiatro kaj mia fako alproksimigas min ankoraŭ pli al E-o, ĉar ĝi estas ligita kun la homa psikologio. Por multe da homaj reakcioj ne estas necesaj vortoj, por ke ili estu komunikataj.

La Internacia Lingvo ege faciligas la kuraciston ĉe kontaktado kun eksterlandaj pacientoj. Por argumenti tion mi prezentas realan okazadon kun pola e-isto en urbo Loveĉ. Pasintsomere li venis kiel gvidanto de E-grupo

el Pollando. La polo estis en malboneg sanstato kaj sen la helpo de liaj bulgaraj amikoj — esperantistoj li mortus. La malsano — akuta apendicito — estis aparta laŭ simptomoj kaj malhelpis la diagnozadon. Kaj ĉe tiu okazo la preciza diagnozo kaj la urga kirurga interveno havis vivsignifon. Do, dank' al E-o estis savita la vivo de Vitold Dobrovolski el urbo Poznan.

Mi subtenas la klopodojn de la kuracistoj — esperantistoj el ĉiuj fakoj starigi kunlaborajn kontaktojn en monda skalo. Gravan rolon tiurilate ludos la III Internacia Medicina E-Konferenco en Ruse. Venkante la malsanojn kaj la morton, la medicinistoj partoprenas aktive en la pabatalo.

D-rino TJURAN OMER

POR EFIKA KULTURA E-AGADO

Dumlonge spertante la konvinkigon, ke efika kultura agado de organizaĵo kiel UEA devas baziĝi sur akcepteblaj evolutivecoj kaj celdifinoj, mi decidis fari provon konturi tian bazon jam komence de mia ofico kiel nova estrarano pri kulturo. Tial, jam en lasta oktobro, mi dissendis cirkuleron pri la temo al ĉirkaŭ ducent kulture engaĝitaj esperantistoj kaj landaj organizaĵoj el rilataj al UEA, petante komentojn, kritikojn, sugestojn. Ĝis nun (komence de marto 1981) preskaŭ kvarono de la ricevintoj de la cirkulero reagis letere, ofte amplekse kaj detale, pro kio mi esprimas miajn sincerajn dankojn.

Mia cirkulera artikolo estis triparta. Unue, ĝi enhavis ĝeneralan priskribon de nia aktuala kultura situacio; due, ĝi prezentis mian provon je gvidlinia difino de la kulturpolitiko de UEA; trie, ĝi antaŭmetis kelkajn konkretajn punktojn rilate pli intensan kaj varian kulturagadon de tiu organizaĵo, laŭeble praktikotajn en kunlaboro kun la landaj asocioj.

Pri la unua parto mi ĉi tie menciis nur la konkludon, ke vere kontentigaj, kulturaj atingoj estas ĉe ni disaj kaj izolitaj, kvankam la latentoj de niaj fortoj ja sufiĉas por pli da efektivo, pli da kohereco. Mankas pli efika interŝanĝado de spertoj, pli ĉelema kunlaboro inter la diversaj kulturagantoj, inter la landaj asocioj, inter ili kaj UEA kaj la diversaj Esperanto-kulturcentroj.

Due, por plifortigi nian memfidon kaj plivigigi la kulturan agadon de UEA sur vasta skalo de entreprenemo kaj kunlaboremo, mi prezentis kvarfazajn la opiniojn, ke ni bezonas: a) kulturfilozofian bazon; b) difinitan kulturpolitikon; c) konkretajn celojn, kaj d) plenumajn rimedojn. Mankas spaco por detala pritrakto, sed mallonga resumo eble ne estas sen valoro:

a) **Kulturfilozofia bazo.** Kiel lingva movado ni nutrighas kulture, transformas kulturajn valorojn kaj ĝeneras novajn. Certe la unue menciita faktoro, kultura nutrigo, ĉiam estis ĉe ni la plej substancia ingredienco. La koncepto konstatas la fakton, ke la uzantoj de Esperanto ĉiam estis nature influataj de siaj propraj naciolingvaj kulturoj, imitis iliajn formajn kaj enhavajn valorojn, transprenis iliajn kriteriojn kaj transformis iliajn apartajn karakterojn por vastetenda utiligo en internacia kadro. La Esperanta kulturo kreskis kaj kreskas el tiu multvaria



BALDUR RAGNARSSON,
estrarano pri kulturo

nutrighado, evoluas kaj direktiĝas al plia aktiveco en novaj sintezaj manieroj kaj aperformoj, kaj la ĝenera procezo komenciĝas. La kultura generado per Esperanto do prenas stimulon el transformoj de nacikulturaj valoroj en la Esperanto-kulturan subtavolon, kio siavice ebligas esence originalan ĝeneradon de novaj kulturvaloroj per la lingvo. Ne estas plia loko por detala argumentado de tia kulturkompreno, kiu ankoraŭ atendas plian diskutadon. Mi tamen volas reakcenti la opinion (kiu jam pruvigis havi la subtenon de la plej multaj komentintoj), ke difino de nia kulturpolitiko devas baziĝi sur konsidero kaj agnosko de tiuj tri esencaj faktoroj: la nutrigo, la transformo kaj la ĝenera, kaj ke interefike ili konstruas kompleksan de funkcio, kiu dinamike ebligas formigon de ĉiam pli aŭtonoma Esperanta kulturo.

b) Nia kulturpolitiko:

La kulturpolitiko de UEA estas maniero de internacia evoluiga agado pere de Esperanto, kiu surbaze de nutrigo el nacikulturaj valoroj kaj iliaj transformoj, kaj de ĉiam kreskanta originala ĝenerado, disvolvas novajn interkompreneblajn valorojn cele al kreo de konscio pri tuthomara kultura komuneco.

Ci-rilate mi volas citi resumajn vortojn de d-rino Marjorie Boulton: „Mi opinias, ke UEA laŭeble celu difinitan kulturpolitikon laŭ la linioj, kiujn vi proponis, sed ke oni penu eviti difinojn tro limigajn; necesas ioma empiriismo. Ofte ni devas modifi niajn ideojn

rilate al la praktikaj eblecoj en diversaj cirkonstancoj“. Prave. Ne sufiĉas teorioj, ni devas ankaŭ esti pretaj adaptiĝi al la konstatoj de la spertoj pri cirkonstancoj kaj situacioj. La supre, ellaborita provo de difino ankaŭ absolute ne devas esti rigardata kiel ia rigida (rigora kunmetaĵo de vortoj). Tute kontraŭe ĝi celas esti sufiĉe ĝenerala kaj fleksebla por neniel malhelpi aŭ ligi nian agadon.

c) **Konkretaj celoj.** En la supre menciita cirkulero mi prezentis 12 apartajn punktojn, kiel konkretajn gvidilojn al pli intensa kaj pli varia kulturagado de UEA. Al tiuj punktoj multaj komentintoj aldonis plurajn aliajn, pli-malpli detalajn. En sekvonta artikolo mi klopodos prezenti organizite tiujn punktojn en formo de ia ideara „banko“. Devas nun sufiĉi la informo, ke la aluditaj celoj ne nur rilatas al la interna disvolvigo de niaj kulturaj laboroj, sed ankaŭ al vojoj de eliro ekster niaj limoj por diskonigi nian kulturon kaj partopreni neesperantistajn kulturajn aranĝojn.

d) **Plenumaj rimedoj.** Sen rilatigo al la reala kultura filozofio kaj celoj ne havas multan signifon. Superflua memorigi pri tio, ke ni jam havas longan tradicion en kreado de ideoj, kiuj restis sen fero. Aŭ por citi d-ron Sadler: „Ĉiu jam delonge konsentas pri la bezono, sed neniu scias indiki, kiu faros tion kaj kiel“. Nu, plenumo estas laŭ mi pli malpli afero de organizo. Grava paŝo estas starigo de komisionoj pri kulturo ĉe la landaj asocioj, kie tiaj ne jam ekzistas, kiuj pretos okupi sin i. a. pri planado kaj plenumado de aferoj sur la kultura kampo en kunlaboro kun UEA. Jam estas dissendita al la landaj asocioj instigo por tio, kiu jam komencis doni rezultojn. Aliaj rimedoj estas jam sub diskuto ĉe la Estraro de UEA, precipe koncerne pli varian eldonadon de libroj kaj revuoj.

Tiu ĉi mallonga skizo pri novaj klopodoj plintensigi kaj plivariigi nian kulturan agadon havas antaŭe la celon instigi niajn legantojn esprimi sin pri la temo, aŭ al la redaktoro de la revuo, aŭ rekte al mi mem. Mi esperas, ke en iu baldaŭ numero mi povos plue disvolvi la temon, precipe rilate al la lastaj paragrafoj (c kaj d), kaj mi bonvenigas ĉiujn sugestojn tie utiligeblajn.

(el „*Esperanto*“, n-ro 4/1981)

LINGVAJ PROBLEMOJ

LA PLEJ Malfacila VORTPARO EN ESPERANTO: «PESI/PEZI»

BERNARD GOLDEN

En sia artikolo „Pri la Neologismoj“ (Bulgara Esperantisto, 1981, n-ro 2, p. 10) L. Miĥajlov provas klarigi, kial certaj leksikaj elementoj en Esperanto estas malfacilaj. Li nomas tiajn vortojn primaraj, ĉar ili estas arbitraj, t. e. „inter la vorto kaj la vortigita objekto ekzistas nenia logika ligo.“ Sekve de tio, la primaraj vortoj devas esti lernitaj aŭtomate, parkere, ne per logika klarigo.

Sajnas, ke aliaj planlingvistoj kaj ankaŭ Zamenhof konstatis tion kaj provis per diversaj rimedoj faciligi la enkapigon de tiuj bazaj lingveroj. Ili celis krei rilatojn en la formoj de vortoj, kies signifoj logike asociiĝas. La plej ofta procedo estas modifo de konsonanto aŭ vokaloj en baza vortskeleto. Kelkaj ekzemploj en la apriora lingvo Suma de d-ro Barnett Russell ilustras tion.

kasa — ruĝb	bato — tablo	todi — kudri
kisa — oranga	bate — meblo	tedi — teksi
kusa — flava	bito — seĝo	todo — kudrilo
		tedo — fadeno

La aŭtoro de Suma asertas, ke tiu ĉi sistemo de asociigoj faciligas la memoron de leksikaj elementoj en lia lingvo. Li argumentas, ke se oni scias unu vorton de la grupo, oni povas rememori la aliajn membrojn pli facile, ol se ili estus malsimilaj radikoj. Tamen oni devas sufiĉe forte streĉi la memoron, ĉar la asociigo ne ĉiam estas memevidenta.

Johann Martin Schleyer uzis la saman rimedon en sia planlingvo Volapuko.

güt — gusti	lil — aŭdi
gut — gustumi	liel — aŭskulti

Gi aperas ankaŭ en Pra-Esperanto 2 (1881—1882).

lev — levi	stud — studi
lef — levigi	stutt — instrui

En neniam publikigita artikolo verkita por La Revuo, Zamenhof donas jenajn ekzemplojn de fruaj formoj de Esperantaj vortoj.

vid — vidi	aŭd — aŭdi
vit — rigardi	aŭt — aŭskulti

La aŭtoro de Esperanto klarigis, kiel li uzis tiun metodon enkonduki ŝanĝojn en la signifon de vorto per modifo de konsonanto aŭ vokalo.

„Mi memoras, ke en la unua tempo mi kun speciala pasio okupadis min per serĉado de diversaj „reciprokaj rilatoj inter la vortoj“. . . Poste venis periodo de reago. Koscianta, kiel terure malfacila estos la propagando en la unuaj jaroj, kaj koscianta, ke rompi la unuan glacion mi povos nur en tia okazo, se mi prezentos al la mondo ion eksterordinare f ac il a n, mi komencis per ĉiuj fortoj premadi la antaŭe ekzistantan lingvan materialon, elĵetadi ĉiun „balaston“. . .“ (Leteroj de Zamenhof, vol. 1, p. 351—352).

En la citita artikolo Zamenhof mencias ankaŭ, ke el la serio da vortparoj kun parencaj signifoj restas en Esperanto nur la vortoj „pezi“ kaj „pesi“. Li ne klarigas, kial tiu „balasto“ ne estis elĵetita. Anstataŭ funkcii nur kiel aŭtomate lernenda primara ero de la leksiko de Esperanto, tiu vortparo fariĝas tre ofta kaŭzo de eraroj, ĉar oni ne povas facile memori, kiu el la du vortoj estas transitiva kaj kiu netransitiva. Kiel estas eble klarigi la eraran indikon en Esperanta-Hungara Vortaro de Alfonso Pechan post kvar eldonoj: „pezi“ estas signita kiel transitiva verbo! Ilustras la uzon de la verbo jena frazo: „la sako pezas cent kilogramojn.“ Ĉu la leksikografo opiniis, ke „kilogramojn“ estas la rekta objekto de „pezi“, kiu pro tio devas esti transitiva verbo? Ĉu li ne komprenis la funkcion de la akuzativo en mezurindikaj adjektivoj? En la sekva citaĵo; la malĝusta vorto de la paro estas uzataj anstataŭ „pesi“ legu „pezi“.

„Gi do devis pesi minimume 30 kilogramojn kaj tia pezo lasas spurojn.“ (Voĉo, 1981, n-ro 2).

Analizo de la uzo de aliaj similaj vortparoj en Esperanto kiel „fronto/frunto“, „pulvo/polvo“ kaj „tabelo/tabulo“ indikas, ke tiaj vortoj estas la plej malfacile lerneblaj el ĉiuj primaraj vortoj. Eĉ scio pri la etimologio de „pesi/pezi“ ne helpas. Ambaŭ vortoj venas de la franca etimo **peser**, kiu estas uzebla kaj transitive kaj netransitive same kiel la angla ekvivalento **to weigh**. Franceparolantoj, do, havas neniun problemon, sed lernantoj de Esperanto daŭre stumblas.

Tiu malfacilaĵo tre frue manifestiĝis en la historio de la lingvo kaj ĝi instigis reformemulojn eltrovi alian esperimmanieron. En sia reformprojekto de 1894 Zamenhof montris, ke unu ebleco estas uzi du malsamajn radi-

kojn: „pez-“ fariĝis „ponder-“ (ntr) kaj „pes-“ restis kiel transitiva verbo. Ido adoptis tiun solvon, sed tute kontraŭe **ponderar** (tr) estas la ekvivalento de „pesi“ kaj **pezar** (ntr) havas la signifon de „pezi“. Occidental kaj Novial sekvas la saman vojon, uzante du radikojn **ponderar** (tr) kaj **pondera** (tr), **pesa** (ntr) respektive.

La dua solvo estas uzi nur unu radikon havantan kaj la transitivan kaj la netransitivan signifojn same kiel la franca verbo **peser**. Tiu verbo en Neo estas **pezi** kaj en Interlingua (IALA) **pesar**. Revenante al la tezo de s-ro Mihajlov rilate la malfacilecon de lernado de

primaraj vortoj, oni povas fari jenan demandon: kiu el la eblecoj ilustritaj ĉi-supre estas la plej facila por lernantoj de Esperanto: (1) du similformaj radikoj, unu transitiva, la alia netransitiva; (2) du malsimilaj radikoj esprimantaj la transitivecon de la verbo, aŭ (3) nur unu verbformo uzebla kaj transitive kaj netransitive? La oftaj eraroj faritaj de lernantoj de Esperanto kaj ankaŭ sperthavaj uzantoj de la lingvo montras, ke la ekzisto de similformaj vortparoj kaj vortgrupoj (ekz. „pinto, punto, punkto, poento“) estas kaŭzo de konfuzo. Male, se ekzistas nur unu vortformo, ekz. verbo uzebla transitive kaj netransitive, la erarebleco ja estas minimuma.

LETERO DE ZAMENHOF

Mi sendas al Vi la frukton de mia longa laborado; ĝi estu signo de mia profunda estimo por la nobla idealisto, kiu laboris por la homaro, ne timante la ridegon de l'amaso. Mi mem plej bone komprenas kiom Vi devis suferi, ĉar mi mem trairis similan vojon; kian mia laboro jam estis preta, mi k'var jarojn devis atendi kaj esti celo de senĉesa ridado, — ĝis mi ricevis la eblon eldoni mian verkon.

Kian mi antaŭ 5 jaroj aŭdis pri la Volapük', mi ne forjetis mian laboron, ĉar la konstruo de Volapük' ŝajnis al mi ne tute praktika; mi diris al mi, ke lingvo tutmonda devas esti antaŭ ĉio komprenebla, kaj la tuta granda materialo, kiu jam per si mem fariĝis internacia, devas resti ne tuŝita. En lingvo, kiu devas fariĝi tutmonda, oni povas krei nur la malgrandan parton, kiu estas malsimila en malsimilaj lingvoj, ĉio cetera devas resti ne tuŝita. Ĉar neniam persono estas tiel leĝdonana por krei lingvon por la tuta mondo laŭ sia volo, kaj tuta vivo de homo ne estas sufiĉa por nove krei la tutan senfinan multon de vortoj de lingvo, kun ĉiuj nomoj de l'landoj kaj urboj, kun ĉiuj sennombraj nomoj teknikaj etc.

Mi estimas Vian noblan deziron porti utilon al la homaro; kun plena estimo por la

aŭtoro de Volapük', mi laboras ne kontraŭ la Volapük', sed por la ideo. Sankta estas por mi la ideo de lingvo tutmonda kaj en kiu ajn formo l'homaro ĝin havos, mi estos kontenta kaj feliĉa. Se oni montras al mi, ke mia laboro estas malutila al la ideo, mi mem detruos mian laboron, kvankam mi oferis al ĝi, la plej bonan parton de mia vivo; la juĝo de l'mondo estos ne decida, la „Lingvo internacia“ restos kune kun la „Volapük'“, kiel du amikoj, kiuj havas unu celon en la vivo. Aŭ unu de la lingvoj mortos per si mem, aŭ la homaro havos du lingvojn, kaj eĉ tio estos por la mondo multe pli bone, ol resti tute sen lingvo tutmonda.

Pardonu, ke mi skribas al Vi en mia lingvo; mi faras ĝin ne pro malgentilo, sed por doni al Vi provon de mia lingvo.

Kun la plej granda estimo

Varsovio, 27/XI 1887.

ESPERANTO

Transskribis: Adolf Holzhaus

Rimarko de Adolf Holzhaus. En la letero, en 9-a kaj 13-a linioj estas arkaikaj formoj kian kaj kiam. Pri tiuj arkaikaj formoj esperantisto F. de Wahl atentigis Zamenhof korekti arkaikajn formojn. Pri tio Zamenhof parolas en la Aldono al la „Dua Libro de l'lingvo internacia“, p. 5, 6, publikigita en 1888:

„La sola ŝanĝo, kiun mi trovas necesa fari mem, estas: anstataŭ „ian.“ „ĉian.“ „kian.“ „neniam.“ „ĉiam.“ — devas esti: „iam.“ „ĉiam.“ „kiam.“ „neniam.“ „ĉiam.“ (por malegali la vortojn „ian“ etc. kaj „ĉian“ etc.)“

GRAVA AKIRAJO

Esperanto estas oficiale inkludita kiel fakultativa studobjekto en la novan lernoprogramon por la IX klaso (I kurso) de la ĉiusecaj mezlernejoj en Bulgario!

Tio sendube estas grava akirajo, kiun ni ŝuldas al la favora rilato de la Ministerio de Popola klerigo al la Internacia Lingvo Esperanto kaj al la nobla populutila laboro de la bulgaraj esperantistoj.

Ni opinias, ke tio estas nur la unua paŝo survoje al l'kompotioma oficialigo de Esperanto en la bulgaraj lernejoj.

Nun — al plena mobilizo por renkonti digne la novan akirajon!



НАЦИОНАЛЕН ФЕСТИВАЛ
НА ХУМОРА И САТИРАТА
ГАБРОВО

GABROVO RIDAS

Se en vagonkupeo aŭ en alia hazarda kompanio iu prezentas sin plovdivano aŭ burgasano, tio neniu impresas kaj la interparolo trankvile fluas plu. Sed se iu dirus, ke estas el Gabrovo, tuj la vizaĝoj gajigas kaj la atmosfero ŝanĝiĝas: „Ho, gabrovano vi estas!“-kaj ridoj kaj demandoj sekvas unu post la alia:

„Cu vere en Gabrovo oni tranĉas la voston de la katoj, por ke vintre oni povu pli rapide fermi la pordon kaj ŝpari varmon en la ĉambro? Cu nokte vi haltigas viajn horloĝojn? Cu vi akceptas viajn gastojn en la domo de la najbaroj?“ k.t.p.

Kio estas la gabrovanoj? Kial ili estas temo de tiom multe da ŝercoj kaj anekdotoj?

Jarcentojn gabrovanoj devis akiri sian panon per peza laboro, en senĉesa batalo kontraŭ la mizero. Por konstrui domon, por aĉeti metiistajn laborlibrojn, por plilarĝigi sian laborejon aŭ aĉeti pli modernajn maŝinojn, por sendi siajn infanojn lerni en meza aŭ supera lernejo, la gabrovano devis ĉiam kalkuli kaj ŝpari ĉiun gajnitan groŝon. Por ĉiu afero li serĉis la plej ekonomian, rezultodonan kaj profitan manieron kaj tio fariĝis gvidprincipo en lia vivo, ĉefa trajto en lia karaktero.

Tiuj trajtoj — ŝparemo kaj kalkulemo restis en la karaktero de gabrovanoj ankaŭ pli malfrue, kiam ili ne estis jam tiel malriĉaj, eĉ kiam ili fariĝis riĉaj homoj... Kaj ĝuste la malkongruo inter ilia plibonigita materiala bonstato kaj la ekstrema kalkulemo kaj ŝparemo estas la centra kerno de la ŝercoj kaj anekdotoj pri gabrovanoj. Verkitaj de sen-nombraj anonimaj aŭtoroj, tiuj anekdotoj senĉese multigis kaj pliriĉigis kaj transformiĝis en siaspecan folkloran arton.

La gabrovanoj ne nur ne hontas pro tiuj ŝercoj kaj primokoj, sed eĉ fieras pri ili kaj komencis prezenti ilin en specialaj ĉiujaraj karnavaloj kaj festoj de humoro! Ili fariĝis pli kaj pli interesaj kaj iom post iom transformiĝis en nacian festivalon de humoro kaj

satiro. De jaro al jaro la famo de tiuj festivaloj disvastiĝis tra la mondo kaj ilin komencis partopreni ŝercemuloj el eksterlando. Eminentaj karikaturistoj, skulptistoj, felietonistoj kaj ĉiuspecaj humoristoj komencis sendi siajn verkojn kaj la ekspoziciaj salonoj jam ne sufiĉas. Gabrovo estas rekonata kiel monda ĉefurbo de la rido...

La entreprenemaj kaj kalkulemaj gabrovanoj tuj komprenis, ke „el tiu arbusto povas eliri granda leporo“ kaj neatendite surprizis la mondon per sia... malavareco! Ili malfermis la kasojn kaj konstruis grandegan „Domon de humoro kaj satiro“, kun multaj ekspoziciaj haloj, restoracio, kafejo, kinejo, stando por vendado de gabrovanaĵoj k. a., proponantaj al la vizitantoj la plej lastmodan komforton... „Sed la elspezoj?“ — miras la publiko. La elspezojn... pagos la gastoj!... Car por gabrovanoj la rido estas senpaga, sed al la gastoj ĝi kostas ofte sufiĉe da mono: dormado en hoteloj, manĝado en restoracioj, aĉetoj en magazenoj k.t.p. En kelkaj jaroj la Domo mem pagos la elspezojn por ĝia konstruado kaj ĉio transformiĝos en puran profiton... Do, gabrovanoj estas gabrovanoj!



- Kiel vi atingis la centjarigon?
- Mi naskiĝis en epoko sen aŭtomobiloj...

Rimarkindaĵo de la urbo estas ankaŭ la kontisto de Elektrotelfera uzino — Stefan Aleksandrov, kiu dediĉis multajn jarojn de sia vivo al kolekto de spritaĵoj. Trastudinte ĉiujn humurmateriojn, kiuj aperis en Bulgario dum la lastaj cent jaroj, traleginte pli ol 300 000 koncizajn humorajn rakontojn, li ĝis nun sukcesis selekti 5300 slipojn da anekdotoj (armenaj, hebreaj, skotaj, gabrovaj, anekdotoj pri eminentuloj k.t.p.)

kaj 13 100 slipojn kun spritaj anekdotoj (pri virinoj, soldatoj, fiŝistoj, ĉasistoj, uristoj, pri la sporto, la arto, la lernejo k.a.), kiuj laŭ speco estas dividitaj en cent grupojn alfabetorde.

La „nesufiĉo“ de papero embarasas la publikigon de tiu kolekto, kiu ampleksus 10 volumojn po 350 mezformataj paĝoj, tralegeblaj minimume en 80 horoj.

Nun ĉiun duan malparan jaron, dum la lasta semajno de majo, en Gabrovo okazas „Dekado de humuro kaj satiro“ kun partopreno de eminentaj humoristoj el ĉiuj kontinentoj de la terglobo. Okazas mondskalaj konkursoj por la plej trafaj karikaturaj, skulptaĵoj, felietonoj, filmoj, fotoj, teatraĵoj kaj pupteatraj spektakloj k.a. kun premioj atribuataj de internaciaj ĵurioj el plej eminentaj fakuloj...

Sub la slogano „La mondo ĝisvivis, ĉar ĝi ĉiam ridis“, la festivalo jam firme okupas sian lokon en la kalendaro de la plej grandaj internaciaj kulturaj festoj kaj ĉiu sentus sin feliĉa partopreni en ĝi. Eĉ la skotoj — la okcidentaj „kolegoj“ de gabrovanoj — sendas reprezentantojn por pliriĉigi sian sperton en la sfero de la ŝparado!...

Kaj la kuracistoj rekomendas partoprenon en la festivalo kiel efikan kuracrimedon kontraŭ ĉiuj malsanoj de nia jarcento.

Neno JANEV

POR KE ONI NE MALGAJNU

Gabrovano prenas el socia biblioteko libron. Legante ĝin, li koleras, ĉar la libro ne plaĉas al li.

— Tiam ne legu ĝin — diras lia edzino.

— Kiel mi povas ne legi ĝin, post kiam mi pagis kotizon al la biblioteko.

JEN PRO KIO

— Minĉo, ŝanĝu la lampon — diras gabrovano al sia edzo. — Metu pli malforte lumantan elektroampolon.

— Kial?

— Ĉi-vespere gastoj venos hejmen. Eble ni malfruigos.

(El la kolekto de St. Aleksandrov)

Literaturo Artoj Kulturo

FRANO KRAL — IDEALOJ KAJ VENKOJ

Antaŭ nelonge niaj slovakaj amikoj sendis al ni karan donacon — la libron „SLOVAKA ANTOLOGIO“, eldonitan esperantlingve de la Slovaka Pedagogia Eldonejo, Bratislava, 1980.

Ĉi-sube ni publikigas versaĵojn de FRANO KRAL (1903–1955) — unu el la kreantoj de la slovak socialisma literaturo, membro de la avangarda marksisma literatura grupo DAV.

KIAM LA VICOJ MARŜIS

Gi estis raviga vidaĵo,
kiam la batalvicoj marŝis sur nia strato,
la vicoj marŝis — kaj niaj koroj sonoregis
ritme kun ilia fiero paŝo.

Netuŝeblecon arde ni al ili deziris,
por ke la furiozaj plumbaj senditoj de l'morto,
al kiuj ili tiel decide renkonten iris,
evitu iliajn belegajn korpojn.
Estis ili herooj de la glora Stalingrado,

estis ili herooj de la tenacega Moskvo,
estis ili herooj el la nevenkita Leningrado,
estis ili herooj indaj je estimo, honorigoj,
gloro!

Kaŭkazo gloriĝas ilian en la nubojn ĉizas,
pasejon siajn en triumfarkojn ŝanĝis Karpatoj,
rapsodie kantas Baltiko, Azovo, la Glacia
kaj Nigra maroj,
pri iliaj agoj senmodelaj, herocaj faroj.

Kaj de Volgo, Dono, Dnjepro, Dnestro, Vistulo,
Odoro kaj Danubo
kantoj, himnoj, odoj, eposoj eksonis
kaj la rusaj, ukrainaj, polaj ebenaj kaj
hungaraj pusto
kantoj, himnoj, odoj, eposoj eksonis
ekfloris por ornamo la vojon al la lasta batalo.

Marŝis la venkaj batalvicoj, marŝis laŭ nia
strato
kaj la juna poeto de Siberio, Igor Grebcov,
en ili;
en la batalo li ame agordadis sian sangoma-
kulitan liron
kaj kantis pri la grandaj filoj de sia patrio.

PLI OL LA TUTA OR' DE L'MONDO!..

En la redakcio estis ricevita letero de nia franca peranto, kiun ni volonte sciigas al niaj legantoj.

„Karaj pacamikoj,

Mi eksciis pri junulino, kiu sin mortigis, ĉar sensukcese ŝi serĉis laboron. Si pafis, per revolvero, inter siajn du okulojn. Ŝi diris antaŭe: „Esti senlabora, estas resti best-nivela. Mi ne volas florojn okaze de mia enterigo, sed flagrubandon kun tiu teksto: „Juna laboristo valoras pli ol la tuta oro de l'mondo“...

Miajn versaĵojn mi dediĉis al Anna-Monika (tiu ja estas ŝia nomo):

Pli ol la tuta or' de l'mondo
Valoras juna laboristo.
Ho, pua* senlabora rondo...
Pli ol la tuta or' de l'mondo.

Ja, Anna, via mortrespondo
Kongruas kun la viv-rezisto.
Pli ol la tuta or' de l'mondo
Valoras juna laboristo!...

* Pu! — interjekcio de naŭzigo

Tomblaine,
Francio,
27. 03. 1981

Roger DEGRELLE

FELICAN FESTON, KARAJ INFANOJ!...



SAVU LA INFANOJN

(Okaze de la de junio — Internacia Festo
de l' Infanoj)

Por feliĉo de niaj infanoj,
por sekuro de nia estonto,
ni nun firme kunligu la manojn,
kreante potencon pacrondon!

Ni neniam forgesu teruron
de la atombombado!... Viktimojn!...
Ili lasis eternajn spurojn
kaj cikatrojn en homaj animoj!...

La uomaro soifas nun pacon,
homoj estas, ja, kontraŭ milito!...
La batalo por paco, aŭdaca,
estas kerno de ĉies spirito!

Do, en niaj popraj manoj
restas la sorto de l'infanoj
kaj nia sankta devo estas
savi la infanojn!...

Petro POLIŠČUK
(Taškento, USSR)

SCIVOLEMAJ

Mi sidas sur la ŝtono kaj mangas panon.
Kaj la pingvenoj venas al mi kaj rigardas
min en la buŝon — ili tute ne povas kompreni
kion mi faras. Ili estas tre kuriozaj.

Vespere mi fiksas la lavujon al tabulo.
Dum mi najligis ĝin al la tabulo unu pingveno
staris kaj atente rigardis, eĉ kapsignis.

Kiam matene mi eliris por lavi min, estis
neeble proksimiĝi al la lavujo: estis kolekti-
ginta amaso da pingvenoj. Akvo el la lavujo
gutas kaj la pingvenoj ĉirkaŭe mute staras
kun kapoj flanke kaj aŭskultas kiel la gutoj
disbatigas sur la ŝtonoj. Por ili tio eble estas
muziko.

Foje en la tendo mi bruligis primuson.
La primuso bruas. Mi rimarkas nenion.

Kiam mi volis eliri el la tendo, mi ne povis:
ĉe la enirejo amasiĝis pingvenoj, aŭskul-
tantaj la primuson. Mi varmigis la teon kaj
malŝaltis la primuson.

La pingvenoj ekkriis, ekbruis. Ili volis
plu aŭskulti.

Ekde tiam mi ofte rebruligadis la primu-
son, por ke ili ĝin aŭskultu.

Genadij SNEGIRJOV



SPORTO

BRILA ESTONTO DE LA SPORTA AKROBATIKO

La akrobatiko estas spektakla, facile alirebla kaj alloga sportspeco. Ĝi estas relative juna ne nur en Bulgario. En ĉiuj landoj, kiuj nuntempe estas membroj de la internacia Federacio de Sporta Akrobatiko, ĝi ekevoluis antaŭ 30—40 jaroj. Sed la komencon de la sporta akrobatiko oni metis antaŭ ĉ. 30 jaroj, kiam okazis la unua landa sportkonkuro en 1952, en la nigramara urbo Burgas.



En 1964 en Bulgario oni fondis federacion de sporta akrobatiko, kiu disvolvis aktivan agadon. El la ejoj de la Supera Instituto de Fizika Kulturo eliris kvalifikitaj trejnistoj, kiuj edukis bonajn sportistojn. Oni komencis trejnadon ekde infanaĝo kaj adoleskeco. En diversaj urboj de la lando estis kreitaj multaj centroj de sporta akrobatiko.

Grava momento en la historio de la sporta akrobatiko

estis la fondiĝo de Internacia Federacio de Sporta Akrobatiko en 1973. La landoj iniciatintoj estis USSR, FRG, Pollando kaj Bulgario. Nun en la Federacio membras 20 landoj. Jam en la sekva jaro post la fondiĝo de la Internacia Federacio en Moskvo okazis la unua mondkampionado. En 1976 la mondkampionado okazis en la okcidentgermana urbo Saarbrücken, kaj en 1978 — en la ĉefurbo de nia lando, Sofio. Je tiuj du ĉampionadoj Bulgario kolektis riĉan rikolon de oraj, arĝentaj kaj bronzaĵaj medaloj kaj okupis duan lokon en la neoficiala teamkonkuro. Ekde 1977 okazas ankaŭ ĉampionadoj de Eŭropo.

La IV mondkampionado kaj III ĉampionado de Eŭropo okazis en la pola urbo Poznań. Laŭ opinio de specialistoj la du ĉampionadoj laŭ la klaso de la partoprenantaj akrobatoj superis ĉiujn antaŭajn similajn konkurojn. La sovetiaj akrobatoj denove estis nevenkeblaj. La bulgaraj reprezentantoj okupis duan lokon. Je la ĉampionado de Eŭropo ili prezentigis ankoraŭ pli sukcese. Ĉio ĉi instigas pensi, ke la sporta akrobatiko allogas ĉiam pli da ŝatantoj en diversaj landoj de la mondo.

En Bulgario jam funkcias vasta reto da centroj de sporta akrobatiko. Tiu bela kaj utila sporto altiras ĉiam pli la junularon. Kaj tio garantias, ke bona estonto atendas la sportan akrobatikon.

Petar MILUŠEV



Du jarojn post la fondiĝo Kuba E-Asocio jam havas ĉ. 1400 membrojn. En la lando okazas amasaj E-kursoj kun centoj da partoprenantoj. La taktiko de Asocio estas: unue informi la publikon per okazigo de amasaj kursoj, kaj poste fondi lokajn E-klubojn.

*

Neordinara E-kurso funkcias en Teherano (Irano). Ĝin partoprenas kelkaj dekoj da oficiroj de la irana armeo, kiuj ĉiutage dum pluraj horoj lernas la Internacian Lingvon.

*

La E-Ligo por Norda Ameriko kaj Kanada E-Asocio antaŭ nelonge dissendis al ĉiuj siaj membroj enketilon pri starigo de kultura kaj feria centro de nordamerikaj e-istoj. Temas pri iniciato aĉeti bienon kaj ekfunkciigi centron similan al la jam ekzistantaj en Gresillon (Francio), La Chaux-de-Fonds (Svislando) kaj Pisanica.

*

Esperanta Ŝak-Ligo Internacia organizas perkorespondan ŝakludadon kaj jam komencis sian trian teamturniron. Interesitoj povas skribi al la organizanto: s-ro Horst Kirmse, Naumburger Str. 23, DDR — 6900 Jena 7, GDR.

distro

ALGEBRA TASKO

VIOLOJ
VIOLOJ
VIOLOJ
+ VIOLOJ
VIOLOJ
VIOLOJ
VIOLOJ
VIOLOJ

AMIKECO

Al sama litero respondas
sama cifero de 0 ĝis 9.
Divenu la ciferojn kaj
faru la algebran taskon!

Rimarko 1=J

Verkis: Marin BAČEV



La lasta ŝanco varbi! . . .

FAMULOJ KAJ ILIAJ STRANGAĴOJ

Betoveno dum laboro neniam razis sin, do okazis foje, ke lia barto estiĝis longa duonmetron.

Cezaro neniam skrapadis sian kapon, timante difekti sian artefaritan hararon, kiu kovris sufiĉe grandan kalvaĵon.

Balzako demetadis sian ĉapelon, kiam li paroladis al si mem.



— Se post unu minuto mi ne trovos arbon grimpi?! . . .

Voltero estis pasia kaŝtrinkulo. Li trinkis ĝis 50 tasoj da kafo tage.

Vellingtono, venkinto de Napoleono ĉe Vatterlo, timis katojn.

Napoleono tre ŝatis trompi dum kartludado.

Bajrono laboris ĉiam en ĉambro kun hermetike fermitaj fenestroj, por ke ne eniru ĉu plej eta enblovo de freŝa aero.

E-KORESPONDAJ KURSOJ

La Internacia Esperanto-Kursejo, Sofio, organizas por fremdlandanoj korespondajn kursojn por ellerno de la internacia lingvo Esperanto.

La kursoj estas por komencantoj, por progresintoj kaj por tiuj, kiuj deziras perfektigi siajn konojn.

La takso por ĉiu grado estas 20 levoj.

La takso pageblas al adreso: 1000-Sofio, DSK-Dimitrovski rajon, s/ka 185/3025 na Mejdunarodnata esperantska ŝkola.

Se tio ne eblas aŭ ne estas preferata, la takso povas esti pagita laŭ maniero konkrete kontraktita. Por pliaj informoj: Internacia Esperanto-Kursejo, 1303-Sofio, bul. Ĥristo Botev 99.